Joseph Freiherr von Eichendorff,

# Allogo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĉu vi aŭdas la susuron
de la arboj tie ĉi?
Ĉu vi vidas jen la muron
de l' kastelo super vi?

Ĉu ne logas rivereto
vin aŭskulti en trankvil',
kiu fluas en kvieto
tra la grundo en lunbril'?

Ĉu memoras vi je tiuj
kantoj el la pasintec'?
Ili revekiĝas ĉiuj
jen en la arbar-solec'.

Kaj la arboj sonĝas jene,
la lilako ravas vin,
flustre vin allogas ene
de l' rivero la niksin'.

*Traduko de la Germana poemo "Lockung" de* Joseph Freiherr von Eichendorff *(∗1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2000-11.*

*MR-333-1 / Arg-225-444 (2004-04-23 09:24:10)*

Joseph Freiherr von Eichendorff,

# Lockung

Hörst du nicht die Bäume rauschen
Draußen durch die stille Rund'?
Lockt's dich nicht hinabzulauschen
Von dem Söller in den Grund,

Wo die vielen Bäche gehen
Wunderbar im Mondenschein
Und die stillen Schlösser sehen
In den Fluß vom hohen Stein?

Kennst du noch die alten Lieder
Aus der alten, schönen Zeit?
Sie erwachen alle wieder
Nachts in Waldeseinsamkeit,

Wenn die Bäume träumend lauschen
und der Flieder duftet schwül
Und im Fluß die Nixen rauschen –
Komm herab, hier ist's so kühl.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Joseph Freiherr von Eichendorff *(∗1788-03-10 – †1857-11-26).*

*Arg-225-443 (2004-04-23 09:21:37)*